


Cena numeru 20 groszy.

# POLA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ

---

---



## ENHAVO:

*Jan Kostecki:* Mikołaj Kopernik.—*Bronisław Kuhl:* Vulpo.—*Mieczysław Kaus:* La Destino.—Grava Dangers.—Komunikoj. — Protokół posiedzenia III Konferencji Oddziałów P. T. E.—Uj—problemo. — Kion ne scias Loka Kongresa Komitato en Nürnberg?—Od Administracjii.—Preseraroj.—Zawiadomienia Zarządu P. T. E.

LA ANONCOJ EN GAZETO

# „POLA ESPERANTISTO“

ESTAS PLEJ CERTA VOJO POR AKIRI LA KOMER-  
CAJN RILATOJN EN POLUJO KAJ EKSTERLANDO  
PROVU KAJ VI ESTOS AL NI DANKEMAI

Prezo de la anoncoj:

en Polujo:

1 pago 100.000 Mk.

½ " 50.000 "

¼ " 25.000 "

⅛ " 15.000 "

eksterlande:

1 pago 12 svisaj frankoj\*)

½ " 6 " "

¼ " 3 " "

⅛ " 2 " "

\*) an egalvalora sumo en nacia mono.

ELDONA SOCIETO

# „POLA ESPERANTISTO“

KOMP. KUN LIM. RESP.

WIDOK 19, VARSOVIO POLUJO.

AKCEPTAS LIBROJN,

PROPAGANDILOJN KAJ ALIAJN

ESPERANTAĴOJN POR KOMISIA VENDADO.

SKRIBU TUJI

# POLA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

JARO XVII WARSZAWA—FEBRUARO—MARTO 1923 J. № 5 (91)

## Mikołaj Kopernik.

(1473—1543)

La 19-an de februaro Polujo festis la 450-an datrevenon de la tago de naskiĝo de sia plej genia scienculo. En tiu tago, en la urbo Toruń ekvidis unuafoje la mondon Mikołaj Kopernik, filo de Krakova komercisto. Li studis komence en katedrala lernejo de Włocławek, poste dum kvar jaroj ĉe la Krakova Jagiellona Universitato, en 1496 lia onklo, varmia episkopo Łukasz Waczenrode sendas lin al Bologne en Italujo por studi ĉe la tiea fama universitato la legosciencojn, krom kiu li jam fervore okupiĝas ankaŭ pri sia amata astronomio. Dumtempe li estas nomita en 1498 kanoniko varmia, kio certigas al li la materialan sendependecon kaj permesas libere daŭrigi la studadon, kiun kompletigas la vojaĝado tra Italujo. En Ferrara, en 1503, li akiras la gradon de doktoro de Dekretoj.

Reveninte Polujon li ankaŭ tie vojaĝas multe, loĝas en Heilsberg, en Olsztyn (kie li gvidas la defendon de tiu urbo kontraŭ germanaj kruckavaliroj), fine ekloĝas konstante en Frauenburg. Lia genia cerbo ĉirkaŭprenas plej diversajn branĉojn de la scienco kaj homa penso ĝenerale. Krom astronomio, li okupiĝas pri matematiko (precipe trigonometrio) kaj ĝiaj teknikaj aplikoj, hidraliko kaj termezurado, konstruas akvokondukojn, prilaboras la kronologion kaj la unuajn geografiajn kartojn de Polujo, Pruslando kaj Varmio, studas medicinon kaj kuracas, studas leĝon laikan kaj eklezian, interesiĝas aktive pri gravaj problemoj ekonomiaj, financaj kaj monsciencaj — kaj ne kontentigante per ĉio-ĉi, li fervore interesiĝas pri bela literaturo, verkas latinajn poemojn kaj grekajn poeziojn, desegnas kaj pentras!



Nur tiel diversflanke edukita homo, kiu en sia potenca cerbo kunigis preskaŭ tutan scion de sia epoko, povis kuraĝi renversi la principajn ideojn de siaj samtempoj pri la konstruo de la mondo. Lin ne haltigas la ŝajna ridindeco de lia genia eltrovo, kiel ne timigas lin la protestoj de konservema socio.

Post longa konsidero kaj studado veninte al la firma konvinko, ke la teorio pri la „centro de la tero“ estas erara, li en sia fama verko „De revolutionibus orbium celestium“ („Pri la movoj de ĉielaĵ globoj“) laŭte proklamas la konsternegantan veron, ke ne la suno moviĝas ĉirkaŭ la tero, sed male, la tero kun neimagebla rapideco rondflugas la sunon! Oni ne komprenas lin, kaj mokas. Martin Luther nomas lin „arlekeno aŭ frenezulo“. La papo metas lian genian verkon sur la liston de libroj, kies legado estas malpermesita de la Eklezio, la eldonanto mem de la verko ŝanĝas ĝian enhavon, klarigante, ke la teorio de Kopernik estas nur *hipotezo, pli faciliganta la kalkulojn*. La 24-an de majo 1543 la sepdekjara Miĉkołaj Kopernik mortas de neniu preskaŭ komprenita, lasanta al posteuloj la plej mirindan juvelon de homa genio en la ekkono de misteraj leĝoj, kiuj regas la universon.

Nun la tuta mondo admire honoras lian memoron. Kaj al ni, polaj esperantistoj, estas speciale dolĉa plezuro kompari lian vivon kun tiu de alia modesta kaj mokata pola geniulo—la kreinto de lingvo internacia.

*Jan Kostecki.*

WLADYSŁAW ORKAN.

## V U L P O.

— Iru ja, alportu ion por la infanoj, ci vidas, ke ili malsatas — diris la vulpino al sia edzo, kiu sin gratis, sidante ĉe la kaverno.

Li alrigardis ŝin malbone, baldaŭ tamen mildiĝis liaj okuloj, kiam li turnis ilin al la vulpidoj, ludantaj ĉe la patrinaj genuoj.

— Ĉi tie eĉ la homo ne sufiĉas — li komencis murmuri. — Ne pli frue ol hieraŭ mi alportis anseron, mi devis trans la rivero ĝin serĉi kaj jam ne sufiĉas. Se vi tiel mastrumados, vi ĝismastrumos neĝojan finon, mi aŭtaŭdiras. Nun ĉiam pli malfacile estas ricevi mutraĵon, la homoj fariĝis singardaj...

— Ne babilu — interrompis la vulpino — sed levigu kaj iru serĉi ion, ĉar baldaŭ estos tagmezo.

La vulpo rektigis kaj oŝcedante rigardis supren.

— Ho ankoraŭ la suno ne suriris la monton.

— Tiel parolu — ekbojis la vulpino malbone okulumante—tiel parolu, ke ci ne volas iri. Ci preferus kuŝi. La tutajn tagojn ci kuŝus. Kaj la nutraĵo mem falos, kvazaŭ strobilo, ĉe la piedojn. Eble ci ankoraŭ dezirus, ke mi kun la idoj alportu ĉion al ci sub la nazon? Sinjore ci volus vivi.

— Eh, ne knaru... Kion ci scias, kiom multe oni devas vagadi. Ĝis kiam oni ion trovas.

— Kaj ci volus, ke ĝi al ci mem falu en la faŭkon. Facile ci volus vivi. Ĉu ci ekmovigos aŭ ne, ci flava bundo?! Eble mi devas iri kaj ci mannutros? Se ci faris la infanojn, do zorgu nun!

— Jam mi konas ĉi litanion...

Li levigis malrapide kaj iris por ne aŭdi pluan knaradon.

— Nur ci zorgu, ke ci sen manĝo ne revenu!—aŭdigis malantaŭ li.

— Bone, bone, bone! — li murmuris irante. — Facile estas ordoni. Sufiĉas la langon rondturni. Por kio mi edzigis. Kiam mi estis sola, do: se mi trovis ion, mi havis, kaj se ne, do ne — neniu min ĉikanis. Se estis io, mi manĝis — kaj se ne, tiam mi kasiĝis en arbustoj kaj dormis la tutan tagon. Neniu al mi ĉe l'oreloj hurletis.

Li iris ian tempon kaj pensis tute nenion (stato en lia gento sufiĉe ofta, malgraŭ la asertoj de kalumniantoj), poste denove renkontis lin diversaj sentoj.

— Mizera estas ĉi tiu vulpa vivo — li veis — Felica la homo! Li havas kokinojn hejme...

Subite naskigis en lia kapo:

— Ĉu ja ni ankoraŭ ne povus havi kokinojn? Oni devas provi. Se oni povus ekhavi vivan paron... Mi eĉ oferus por tiu intenco fasti la tutan tagon. Bah, sed tio estas treege malforta, tuj mortas sub la piedoj, se oni ĝin eĉ plej delikate kaptas...

Irante li pripensis tiun ideon kaj ridetis al la perspektivo, klun prezentis al li la imago.

...Ili paŝtas sin ĉe la kaverno. Paŝtas sin tuta aro. Nigraj, blankaj, striataj. La infanoj petolas kun ili, kvazaŭ timigas, kiel junaj katoj, sed neniu kuraĝas tuŝi. La patro malpermesis. Kaj li kuŝas ĉe la kaverno kaj ĝojigas la okulojn per tiu bildo.

— Ke ili nur volu teniĝi... Nu, sed kial ne?—li konsoligās. Oni klarigos al ili, ke la homoj ankaŭ ne estas pli bonaj, kaj ne pro belaj plumoj ilin nutras. Kaj nenie ili havus tian estimon. Kun amo mi zorgus pri ili... Nur kiel elteni, por ne tuŝi ilin. La homo scipovas, nur certe, ĉar li la herbon ankaŭ povas manĝi.

Por fini tiujn revojn li aldonis enpense...

— Oni devos tiun ĉi ideon pripensi en libera momento. Sed dume oni devas ankoraŭ uzi la malnovajn manierojn...

Li haltis kaj komencis konsideri, kien direktiĝi. Trans la rivero li estis hieraŭ, do tie certe la homoj sin gardas.

— Strange neantaŭvidemaj homoj...

Plej oportune estus iri al la kabanoj ĉe l'arbaro, tamen tre danĝere, tro proksime al la kavo. Li observis la malnovan principon konatan ankaŭ de la homoj: „La vulpo apud sia kavo neniam sufokas la kokinojn“. Depost praavoj lia familio loĝanta en tiu ĉirkaŭaĵo observis tiun ĉi principon; kiam li trans la monto havis la kuŝejon, li ĉasis tie ĉi—ekloĝinte ĉi tie li ĉasis trans la monto. Ĉiam por erarigi la homon, se tiu dezirus siajn laŭdirajn maljustaĵojn venĝi je la vulpa gento. Tiun principon la pravlupo kun saĝa antaŭzorgemo elpensis kaj liaj posteuloj fidele ĝin observis, kvankam ĝi ne havis plu signifon, de kiam la homoj sciigis pri ĝi. Ĝi estis tradicia antaŭ — zorgemo—senvalora.

Tial ankaŭ nia honesta vulpo ne intencis ŝanĝi la moron: havante ĉi tie la sidejon, li decidis iri trans la monton.—Estis vere malproksime, ĉar oni devis ĉirkaŭ — iri ronde la tutan monton kaj reveni de alta flanko, tamen la perspektivo estis...

Pripensinte iom li elektis la pli longan vojon tra l'arbustoj por ne renkonti iun senbezone. Longan tempon li kuris en silento—la arbaro komencis maldensigi—subite haltigis lin susuro; li rigardis supren, ĉar la susuron preskaŭ per la okuloj sciis kaptadi kaj ekvidis nigran sciuron, kiel ĝi sidis sur la arbo kaj kraĉis desupre, dezirante „feliĉan ĉason“.

— Mi donus al ci feliĉan ĉason! — li ekmurmuris — se ci ne sidus tiom alte...

Li simulis ion ordigi ĉe sia vosto, por ke ĝi ne pensu, ke li pro ĝi haltis, poste li trankvile ekkuris pluen.

Irante li pensis pro tiu akcidento:

— Kial ja Sinjor' Dio donis al kelkaj kreitaĵoj tian talenton, ke ili povas sur arboj rampi aŭ en aero flugi.

Ekzemple akcipitro... la kokinon, kiun mi mem trovis, de antaŭ la nazo kaptas, nu kaj postkuru lin! Maljusteco regas la mondon...

Tamen baldaŭ li ĉesis amuziĝi per tiaj pensoj, ĉar jam la arbustoj maldensiĝis kaj li devis diligente atenti ĉiu flanke. Ankaŭ, kurante, pro kutimo pli ol pro pripenso, li trarigardis la juniperojn, ĉu ie leporo ne dormas aŭ la flugila vivaĵo. Sed nenion interesan li rimarkis.

Kiam la arbustoj finiĝis, li kaŝkuris plue laŭ la rivereto kaj kiam tiu ankaŭ malaperis, li devis tra alfluetoj ŝteliri singarde supren. La lasta alflueto fioiĝis preskaŭ ĉe la domoj. Do longe tie nia vulpo pripensis, ĝis kiam li kuragiĝis eliri sur la malkovritan kampon. Antaŭ ĉio li per la okuloj traesploris la ĉirkaŭaĵon, poste la orelojn sendis antaŭgarde—kaj kiam li nenion malbonan rimarkis, singarde eliris.

En proksimo staris kabano, sed neniu viva animo aŭdiĝis. La suno brulis; nia vulpo do kuris al la ombro de l'fruktarboj de kie li ĉirkaŭrigardis pli atente — nenio. Fine atingis liajn streĉitajn orelojn ia surda klukado, kvazaŭ de post ses muroj. Li jam konis tiun melodion malklaritan, tiom agrablan por la oreloj kaj tiom doloran por la koro pro malproksimo. Li dezirus ĝin aŭdi de proksime... Venis do al la muroj, ĉirkaŭiris ilin laŭpove, subaŭskultis, tamen la klukmelodio neniel klariĝis. Li staris, enloke piedpaŝis, plenaŭskultis tiom, ke la okuloj pleniĝis per la larmoj, fine vole-nevole foriris al la najbara kabano.

Irante li pensis:

— Strangaj homoj... senbezone la kokinojn enfermas. Kiu vidis ion similan! Nek aeron, nek akvon... Ili tie ĉiuj mortas.

Tiasence li pripensis momenton, poste duobligis la atenton, ĉar jam la sekvanta kabano montriĝis; li kaŝiĝis ĉe kamprando kaj tre singarde sin alŝovis.

Li rigardis... La kokinoj sur la kampo sin paŝtas... tuta aro... Bah, sed paŝtisto ĉe ili, gardas, ĉirkaŭiras, kunpelas, eĉ momenton ne ripozas.

— Jen prudento! Kiu vidis paŝti la kokinojn kvazaŭ safojn... Kaj kiel ili estas belaj, sentimaj! Ah, se iom pli proksime...

Li alrigardis de la kamprando, sopiris multe kaj vole-nevole ekiris al la sekvanta kabano.

— Tie mi eble sukcesos, jam estas tempo... La infanoj atendas malsataj—li rigardis la sunon—jam tagmezo...

Kaŝigante sub la altaĵ kamprandoj tiel, ke li nur la tegmentopintojn povis vidi, li kuris al la herbejoj. La kamprando ĝuste finiĝis. Li eliris singarde la kapon — kaj lia koro ekstrems ĝojege.

Li vidas... la kokinoj sin paŝtas sur la herbejo... neniu ĉe ili. Li mezuras per la okuloj la spacon dividantan lin de tiuj karaj estaĵoj. Iom tro malproksime... Ke ili iom aliru... Li instigas ilin per la okuloj—per la tuta deziro, per la tuta volo sendata pere de la enamiĝintaj okuloj, penas ilin alvoki al si. Precipe unu al li ekplaĉis... plumhava, granda, striita. Tiun koloson li ĉiam preferis. Do li ridetas al ŝi ame, preskaŭ kortuŝe... Subite unu el ili, stulta, avertis. Ili ekkriegis kaj for... Kolera pro tio li elsaltis kaj postkuris. Tiumomente aperis hundo ĉe la kabanoj kun tia baŭo, kvazaŭ la vilaĝo almenaŭ brulus, kaj rekte kuras... „Mangŭ diablojn!.. Oni ne staru sur vojo de stultulo!“ — ekpensis la vulpo tuj kaj rapide sin returnis.

Baldaŭ li atingis la rivereton, kuris ĉe ĝi laŭflue kaj haltis ne pli frue, ol kiam tiu malagrabra bojado silentiĝis.

Li koleris kontraŭ si, ke li lasis sin tiel timiĝi, sed ankoraŭ pli granda kolero lin tremigis je la rememoro de tiu haŭbuŝo.

Por ke ci per seka ligno cin nutru! Hundo stulta, senkultura...

Kore li malamegis ĉi tiun fian genton, kiu laŭlegende havis unu prapatron kun la vulpa familio, sed poste lasis sin subaĉeti de homoj.

— Por kio oni ĝin nutras? Nek boji ĝi scias honeste, nek aŭdosenton havas, nenion havas, kio povus plaĉi.

Tiel li koleris ripozante, fine malĝojo lin atingis kun la ombro plilongiĝanta de la pinoj.

— La suno subiras... Ombro kreskas... La infanoj atendas... La patrino koleros, ke mi tiel longe ne revenas... Iru ŝi mem la sekvantan fojon, sciĝu, kiel tio estas facila. Mi volis ja—sed vane—ne sukcesis. Kiel nun... Tia bona okazo! kaj vane—tiu hundaĉo malhelpis. Oni donas al fiulo mangon, alportas al li sub la nazon, do ŝajnas al li, ke neniu bezonas mangi. Ha, se mi cin atingus... nu, mi donus al ci, ha, donus ŝupon!..

Perforte revenadis lia penso al la hundo, sed oni devis ion decidi, ĉar la vespero proksimiĝis. Li rememoris, ke estas ankoraŭ unu kabano. La espero revenis.

— Oni devas provi lastafoje...



Li levigis kaj iris en la direkto, en kiu laŭ ia rememoro staris la kabanoj. Li ekvidis fine iliajn tegmentojn. Jam pli singarde li movigis, serĉante fosojn, kavojn kaj enprofundiĝojn, ĝis li subite trovis sin ĉe frukta ĝardeno. Ĝi estis ĉirkaŭita per breta barilo. Do li levigis sur la malantaŭaj piedoj kaj enrigardis internen tra fendo.

Tre bone. Ili estas en la ĝardeno... Li antaŭsentis jam ilin, antaŭ ol li ekvidis. Estas maljunaj, estas ankaŭ mezaj kokinoj kaj estas junaj ankoraŭ kokidoj!

— El ĉi tiuj oni povus iam en libera momento preni paron por eduki... Kaj dume iun el la maljunaj mi prenu... Sia vivo ne estas ja eterna...

Tamen kiel eniri? La barilo estas alta, la fendoj mal-largaj inter la bretoj, ke eĉ la kapo ne enpremiĝus. Li komencis kuri ĉirkaŭe serĉante pli grandan fendon.

— Strangaj homoj — li pensis dume — ĝardeno sen pordo... Kiel do ili tien enpelas tiujn kokinojn?

Subite li eksentis teruran doloron—io kaptis lian piedon per akraj dentoj. La makzelojn li kunpremis por ne ekboji pro sufero. Li ekrigardis — kaj jen la antaŭa piedo restas inter du ringoj... Tuj li aŭdas krion: „Jen ĉi!“ kaj vidas kelkajn personojn, kurantajn rapidege en la kabanon. Li skuigis unu kaj duan fojon — ĉiam pli akra doloro—la ringoj ne lasis... Li sentas, ke la fero jam dispremas la oston.

Momenton kaj la homoj alkuros.

Do li kolektas la tutan obstinon — kaj sen pripenso: krasti per la dentoj—demordis la piedon, kie ĝin tenis la kaptilo kaj al fugo... Ĉiujn fortojn kolektas enkure, ĉar la homoj tuj malantaŭ li—kun bastonoj. Sur tri piedoj li kuras, kvazaŭ sur kvin. Jam, jam la rivereto—jam arbustoj, li postrigardas—la homoj ne ĉesas... Do plue—atingis la arbustojn—ne haltas—kuras en rivereton — en la akvon — la piedojn tute ne sentas. Fine en la arbareto... Malrapidigis la kuron, tamen ankoraŭ ne tre kredas, kolektas la fortojn por plue, kiom eble plej malproksime... Fine jam paŝi li ne povis, la doloro eksentigis. Li sidigis sur la musko kaj komencis flegi la piedon...

Estis jam malfrua krepusko, kiam nia vulpo lamante sur tri piedoj, altrenis sin al loko, de kiu li antaŭtagmeze deflankigis en la arbustojn.

— Felĉan ĉason! — venis al li desupre.

Li rigardis, la sama nigra sciuro rigardas sidante sur la arbo kaj faligas sur lian ŝultron strobilajn ŝelojn.

Li simulis ne aŭdi kaj trenis sin plue, ĝemante profunde, suferi. Fine li venis al la kaverno.

— Tiel frue?! — ekkuris la vulpino kaj vidante, ke li nenion portas, montris la dentojn al li: — Kion ci alportis? Cian kadavraĵon fetoran?! Domaĝo, ke oni tute ne... ci hundo flava...

Li foriris de ŝia kolero kaj ne pasigis la nokton en la kavo. Elserĉis al si en la densaĵo lokon la plej malbelan — tie li sidigis sur la samaj tri piedoj kaj versante abunde larmojn ploris. — Al la homoj tamen estas pli bone — li pensis, kiam la doloro mildigis. — Ili ne bezonas serĉi por la vespermangaĵo tiun ĉi stultan kokinon...

Oni devas aldoni, ke tiu vulpo tute ne konis urbon.

*El la pola lingvo tradukis*

*Br. Kuhl.*

## *La Destino.*

*Folioj printempaj ekfloris  
Kaj verda fariĝis la tero,  
La freŝa aero odoris,  
Allogis la milda vespero.*

*En homoj viviĝis la revo  
La penso vekigis anĝela  
Tra maro ĝin portis la mevo,  
Al nubo flugadis ĉiela.*

*Aperis la suno somera,  
Diskreskis la bela naturo,  
Eksonis la kanto ne tera  
Kaj regis senlima plezuro.*

*La revoj de homoj atingis  
La celon de sia vojaĝo,  
Nenio la amon estingis  
Dum ĝia matura plenaĝo.*

*Sed baldaŭ aperis aŭtuno,  
Sur arboj ekvelkis folioj,  
Malvarma fariĝis la suno,  
Ekĝemis la fortaj tilioj.*

*Sur frunto de homa animo  
Montriĝis sekreta doloro,  
Al revoj aperis la limo,  
Ekploris malĝoja la koro.*

*Kaj fine surŝutis la mondon  
La neĝo malvarma, terura,  
Sur akvoj haltigis la ondon,  
Silentis la pulso natura.*

*Kaj falis la homa jam revo,  
Kaj penson ne vekis la amo  
Ne portis tra maro ĝin mevo,  
En koro ne vivis la flamo!*

*Mieczysław Kaus.*

## Grava danĝero.

Diligenta leganto de esperanta gazetaro rimarkis certe, ke de post kelka tempo pli kaj pli forte vidiĝas en ĝi fenomeno, kiu devas ĉagrene kaj maltrankvile sulkigi la frunton de konsciencia amanto de nia ideo.

En la unua vico marŝas la Malproksima Oriento. Diversaj „Verdaj Lumoj, Ombroj kaj Utopioj“, tre malbonlingvaj, sed fervore kunredaktataj de tiu speco de rusaj „mondsavantoj“ malkleraj, fanatikaj kaj drinkemaj (produkto de iama cara tiraneco), klujn ni tiel bone konas en Polujo! — celas nepre *kunligi la aferon de Esperanto kun siaj socialaj teorioj kaj postuloj*, noblaj eble, sed certe infane konceptitaj, kaj tial treege minacaj en ilia apliko al la reala vivo. La punkto de kunigo de la lingvo internacia kun tiuj tiel malproksimaj objektoj montriĝas esti, nature, la malfeliĉa Interna Ideo, „malfeliĉa“, ĉar tiom trouzata kaj tiel malbone interpretata de multaj samideanoj. En unu el la cititaj gazetoj vi trovos eĉ kortuŝantan rakonton, kun kia dolora korskuro nia genia Majstro subskribis la Bulonjan Deklaron pri neŭtraleco de Esperanto, kvazaŭ mortverdikton por sia plej kara ideo. Kontraŭ tiu kruda falsajo ni devas, en la nomo de vero kaj de nia respekto al la memoro de Aŭtoro de Esperanto, *laŭte protesti!*

Eble en iom pli malalta grado, la malsano vidiĝas tamen ankaŭ en la parto de nia eŭropa esperanta gazetaro. Ni ne parolas jam pri la „Sennacleca“, kiu estas malpli danĝera, ĉar pri ties partia karaktero neniu povas konservi dubojn, sed multaj aliaj revuoj penetriĝas de la sama erara spirito. Eĉ nia strandarda gazeto, la geneva „Esperanto“, sub la redakto de nia admirinde energia kaj talenta ĉefo Privat, faris lastatempe kelkajn paŝojn sur tiu oblikva vojo.

En tia stato, necese estas demandi klare: kion ni volas?

Ĉu ni, esperantistoj, celas renversi la nunajn principojn de la vivo de popoloj kaj konstrui alian mondon? Ĉu ni celas nenligi la ŝtatojn, krei mondan imperion, forigi la naciajn lingvojn, kaj en unu respubliko kun unu lingvo Esperanto egaligi ankaŭ la ekonomian staton de ĉiuj homoj?

Por vera esperantisto, sendepende de liaj personaj ideoj, respondo povas esti nur unu: *ne!* Esperantismo nek estas movado politika, nek ekonomia: ĝia sola socia celo estas enkonduko de Esperanto kiel helplingvo tutmonda. Kiu volas ligi kun ĝi fremdajn principojn, tiu ruinigas ĝian progreson. Tion bone komprenas ankaŭ tiuj, kiuj tion faras. Sed la kaŭzo de iliaj agoj ne estas nescio: ĝi estas, simple kaj nure, ke ili ne amas Esperanton. Ili amas siajn socialajn teoriojn kaj Esperanto estas por ili nur rimedo, kiu devas helpi al la realigo de tiuj teorioj. Tiuj-ĉi niaj vortoj restus do tute vanaj, se ili estus direktitaj al ilia prudento.

Sed ni vokas al vi, *veraj* esperantistoj! Ili parolas, kaj ni silentas. Ili malutilas, kaj ni atendas. Ni deklaru firme, ke ni *ne permesas tronsi nian nomon*. Ke ni lasas la politikon al politikistoj, kaj la ekonomion al ekonomistoj. Ke ni nenion volas detrui, kaj nia unika deziro estas donaci al la homaro la ĉarman floron de nia melodica lingvo.

Estus bone, se sur la kovriloj de niaj organoj aperus surskribo: „*La gazeto estas fidela al la Bulonja Deklaro*“. Tiam ĉiu esperantisto estus tuj informita, kiu efektive laboras por Esperanto.

En la № 1 de „Pola Esperantisto“ (Oktobro 1922) ni jam okupiĝis pri la Interna Ideo. Ni diris tie, ke *lingvo internacia, laŭ sia principo, devas celi la internacian proksimiĝon*; ni esprimis deziron, ke Esperanto povu jam nun servi kiel ilo de *reciproka ekkono de nacioj* (plejparte malamo inter nacioj estas ja malkono!); ni aldonis, ke ni ŝuldas al la kara memoro de la Majstro laŭpove, *ekster Esperanto*, labori por la homara paciĝo. Ĉio ĉi estas konforma al la Interna Ideo, tamen *ne estas ĝia necesa sekvo*, ĉar la Ideo nenion postulas de esperantisto: ĝi ne estas politika aŭ socia principo, ĝi estas nur tiu *amika sento*, kiun homo, uzanta Esperanton, portas al alnaciianoj. Tion pruvas klare ankaŭ ĝia nomo: ĝi estas *interna*, sekve kaŝita en koro, en la animo, neesprimita en ia ajn reguloj. Ni havas do la devon protesti, kiam iu sufloras altrude, ke ĝi estas

sennaciismo, aŭ socialismo, aŭ komunismo, aŭ pacifismo— ĉar ĝi estas nia privata, individua propraĵo, pri kies uzo kaj direkto neniu rajtas decidi.

Do, oni ne divenaĉu la sentojn de la Majstro! Tiu granda homo varme kaj sincere amis sian verkon. Tial la bonaŭgura tago de la Bulonja Deklaro devis certe naski en lia koro la sentojn de fiero kaj feliĉo. Li ekvidis tiam sian amatan infanon eniranta la vojon de serioza disvolvigo. Sub la konstruaĵon de Esperanta Movado metita estis baza ŝtono, sur kiu ĝi povis vigle kaj libere levigi supren.

Poste, la alta saĝo de D-ro Zamenhof ordonis al li demeti de si ĉiun oficialan rolon, anĉaŭ ol li komencis la publikigon de siaj privataj socialaj opinioj. Nun tiu grandvalora saĝo, bedaŭrinde, mankas al multaj.

Sed ni, veraj sekvantoj de la Majstro, ni, sinceraĵ amantoj de Esperanto, ne permesos, ke en la faldoj de nia standardo oni kontrabandu ion ajn, ni ne permesos, ke oni subfosu la templon, masonitan per reno kaj ŝvito de Unuaj Pioniroj.

Tion la verdkapaj utopistoj memoru!

## K O M U N I K O J.

— Nova grupo fondiĝis en Inowrocław. kies nomo estas: „Kujavia Grupo Esperantista“. Prezidanto estas gimnazia profesoro J. Orzech kaj vicprezidanto pastro Dębski. La grupo kalkulas ĝis nun 40 membrojn inter kiuj multajn geinstruistojn.

Oni gvidas kurson kun 30 ĉeestantoj.

— Nia fervora kaj eminenta samideano el Łódz S-o Włodzimierz Pfejffer post kelkaj monatoj de foresto revenis tiun urbon kaj denove komencas propagandon.

## Protokół

posiedzenia III Konferencji Oddziałów Polskiego  
Towarzystwa Esperantystów.

Dnia 6 stycznia 1923 roku, jako w pierwszym dniu wyznaczonym na konferencję oddziałów P. T. E., zebrali się w lokalu Zakładu fotograficznego „Studio“ w Warszawie przy ulicy Żórawiej pod Nr. 34 delegaci następujących Oddziałów Towarzystwa: 1) z Warszawy Jan Ko-



stecki, Kazimierz Tymiński i Antoni Czubyński, 2) z Krakowa Bronisław Kubl, 3) z Poznania Franciszek Maliszewski, 4) zastępca oddziału P. T. E. w Wilnie Stanisław Essigman, 5) zastępca oddziału P. T. E. w Łodzi Stanisław Karolczyk i 6) zastępca oddziału P. T. E. w Rudzie Pabjanickiej Antoni Stankiewicz. Nie przysłały delegatów i nie zawiadomiły o przyczynach ich nieprzybycia oddziały: w Siedlcach, w Pabjanicach, w Zduńskiej Woli i w Olkuszu. Na przewodniczącego powołany został p. Jan Kostecki wice-prezes P. T. E., na sekretarza p. Antoni Stankiewicz sekretarz P. T. E. Po stwierdzeniu, że zaproszenia na konferencję zostały wysłane wszystkim oddziałom we właściwym czasie listami poleconymi i że liczba przybyłych do prawomocności uchwał jest dostateczna, zebrani uznali zjazd za prawomocny. Przewodniczący zagał posiedzenie i przedstawił zebranym program obrad, który bez dyskusji został przyjęty, a mianowicie:

1) Sprawa rezygnacji profesora Odo Bujwida ze stanowiska Prezesa P. T. E. Referuje p. Stanisław Essigman.

2) Sprawa stosunku Polskiego Towarzystwa Esperantystów do Federacji Towarzystw Esperanckich w Polsce. (Federacio de Esperantistaj Sociotoj en Polujo). Ref. p. Jan Kostecki.

3) Sprawa udziału Polskiego Towarzystwa Esperantystów w wydawaniu „Pola Esperantisto”. Ref. p. A. S. Stankiewicz.

4) II Kongres Wszechpolski Esperantystów.

5) Wolne wnioski.

W odpowiednim porządku powyższego programu, po przedyskutowaniu spraw w nim przedstawionych, zebrani na III Konferencji Oddziałów Polskiego Towarzystwa Esperantystów, jako przedstawiciele ogółu esperantystów, zrzeszonych w organizacjach Polskiego Towarzystwa Esperantystów, powzięli następujące uchwały:

Ad. 1) Po zbadaniu dokumentów: a) protokołu Zarządu Polskiego Towarzystwa Esperantystów z dnia 26 lipca 1922 roku, b) listu własnoręcznego profesora Odo Bujwida do Dra Emiljana Lotha z dn. 26 lipca 1922 roku, c) trzech dokumentów Zarządu Federacji Towarzystw Esperanckich w Polsce z dnia 31 lipca 1922 roku, podpisanych przez Profesora Bujwida, jako prezesa Federacji, d) telegramu podpisanego i wysłanego przez prof. Bujwida do Dra E. Lotha do Helsingforsu, e) listu Zarządu Federacji do Polskiego Towarzystwa Esperantystów z d. 31 lipca 1922 roku, podpisanego przez prof. O. Bujwida, ja-

ko prezesa i f) telegramu p. Kosteckiego do p. St. Essigmana z dn. 10 sierpnia 1922 roku;

zważywszy; że po złożeniu mandatu prezesa Towarzystwa przez profesora Odo Bujwida Zarząd P. T. E. wydelegował do niego dwóch członków zarządu, p.p. Karolczyka i Kosteckiego, dla wyjaśnienia sprawy, o czym zawiadomił go listownie, że od tego czasu upłynęło około czterech miesięcy i pomimo parokrotnych piśmiennych przypomnień, w odpowiedzi na jego listy, w których się tłumaczy brakiem czasu, prof. Bujwid nie umożliwił delegatom P. T. E. wyjaśnienia sprawy, — sprawę złożenia mandatu przez prezesa profesora Odo Bujwida uznać za wyczerpaną i przejść nad nią do porządku dziennego.

Ad. 2) Zważywszy, że II Komunikat Federacji Towarzystw Esperanckich w Polsce, opublikowany w Nr. 105 pisma „Esperanto Triumfonta” z dn. 8 października 1922 r. bezzasadnie i niesprawiedliwie obraża poważanego członka Polskiego Towarzystwa Esperantystów D-ra Emiljana Lotha, że pismo p. Edwarda Wiesenfeld-Lonkopolańskiego w imieniu Polskiego Instytutu Esperanckiego do p. Stanisława Karolczyka, członka Zarządu Polskiego Towarzystwa Esperantystów, wystosowane jest w stylu wysoce niewłaściwym, i że odpowiedzialność za to pismo ponosi również Federacja Towarzystw Esperanckich w Polsce, co wypływa z treści pisma tego Instytutu do p. Jana Kosteckiego z dn. 24 listopada 1922 r., pisanego pod firmą Federacji, że Polskie Towarzystwo Esperantystów w żaden sposób nie może przyjąć odpowiedzialności za obydwa powyższe fakty, które, jako członek federacji, ponieść by powinno, że jak wynika z pism Polskiego Towarzystwa Esperantystów z dn. 27 października i 3 grudnia 1922 r. do Federacji i z pism Federacji z d. 23 listopada i 11 grudnia 1922 r. do Zarządu P. T. E., wszystkie wysiłki Zarządu P. T. E. w celu przekonania Federacji o niewłaściwości powyższych postąpień i o konieczności ich odwołania pozostały bezskuteczne — zebrani uchwalają: *Polskie Towarzystwo Esperantystów wycofuje się ze Związku Towarzystw Esperanckich w Polsce i nadal za działalność Federacji żadnej odpowiedzialności na siebie nie przyjmuje.*

Ad. 3) po wysłuchaniu referatu sekretarza P. T. E. p. A. S. Stankiewicza uznając za niezbędne dla ruchu esperanckiego w Polsce istnienie pisma i towarzystwa wydawniczego zebrani uchwalają: *Polskie Towarzystwo Esperantystów przyjmuje na siebie popieranie związane-*

go w Warszawie Towarzystwa pod nazwą: Towarzystwo Wydawnicze „Esperantysta Polski“ spółka z ograniczoną odpowiedzialnością (Eldona Societo „Pola Esperantisto“ Kompanio kun limigita respondeco) 1) przez zapisanie się na udziałowców Towarzystwa wydawniczego bądź całych oddziałów, bądź poszczególnych członków P. T. E., 2) przez kolportowanie pisma „Pola Esperantisto“ i wydawnictw Towarzystwa, 3) przez dostarczanie do „Pola Esperantisto“ korespondencji, artykułów, komunikatów i działalności oddziałów i wszelkich prac do druku.

Ad. 4) Po wysłuchaniu przedstawionych przez p. Jana Kosteckiego uzasadnień, oraz po rozważeniu i szczegółowem przedyskutowaniu wniosku i uwag zgłoszonych przez pp. Kubla i Essigmana, zebrani uchwalają: 1) Zwolnienie wszechpolskiego Kongresu Esperantystów uznać do pewnego czasu za niewskazane, a natomiast uznać za pożądane urządzenie Konferencji Oddziałów P. T. E. częściej, w składzie liczniejszym i o więcej ożywionym i urozmaiconym programie, 2) w razie zwołania w roku bieżącym II Wszechpolskiego Kongresu Esperantystów przez jakiegokolwiek organizację esperanckie inne, Polskie Towarzystwo Esperantystów oficjalnego udziału w tym Kongresie nie weźmie.

Ad. 5) Na wniosek p. Bronisława Kubla postanowiono drugi dzień konferencji poświęcić pogawędce na temat zadań oczekujących Towarzystwo Wydawnicze oraz treści i formy pisma „Pola Esperantisto“ na przyszłość.

Po wyczerpaniu w ten sposób porządku dziennego zebrania przewodniczący posiedzenie zamknął.

### Uj—problemo.

La artikolo de nia ŝatata kunlaboranto Baroko s. t. „Solve nenion solvanta“ (Nr. 4 de jan. 1923) kaŭzis multajn protestojn. Ni sentas do la devon klarigi la vidpunkton de la Redakcio pri la landnoma demando. La decidon de la Akademio pri „uj“ oni certe *devas respekti* kaj de nun konsideri la finaĵon „io“ malkorekta kaj evitinda. Ni kredas tamen permesebla la uzon de finaĵo „lando“ en la okazoj, kiam ĝi estas pli belsona ol „ujo“, kio estas laŭfundamenta kaj ne kreante ion novan, ne celas ankaŭ forigi la devigan regulon.

*La Redakcio.*

**Kion ne scias Loka Kongresa Komitato en Nürnberg?**

Kuŝas antaŭ ni du kongreskartoj Nr. 2115 kaj 1870 kiuj venis el Nürnberg en koverto adresita: Warszawa, RUSIO.

Ĉu efektive la anoj subskribintaj ilin *S-roj D-ro Leder mann kaj Königsberger* ne scias ke Warszawa estas ĉefurbo de Polujo?

Ĉar ni ne volus suspekti ke oni adresas tiamaniere spite.

## AVIZO DE LA ADMINISTRACIO.

Organizaj klopodoj de la Eldona Societo „Pola Esperantisto“, kies propraĵo estas nia gazeto, malfruigis la aperon de tiu-ĉi numero, por kio ni petas de niaj legantoj afablan pardonon.

Aliflanke, la multe falinta valoro de la pola marko devigas nin altigi la abonprezon en Polujo. Por eviti estonte malagrablajn ŝanĝojn, ni decidis kalkuli ĝin en zloty polski, fiksante la prezon de unu numero je 20 groŝoj=0.2 da zloty (12 numeroj=2 zł. 40). La kurantan valoron de zloty en polaj markoj oni kalkulu laŭ oficiala kurzo de la Stata Ora Prunte en lasta semajno.

Niaj abonantoj estas petataj kiel eble plej baldaŭ (en ilia propra intereso) alsendi al ni la mankantan monsumon per ĉekkonto de P. K. O. 3874.

*La Administracio.*

## OD ADMINISTRACJI.

Sprawa organizacji Towarzystwa wydawniczego „Polski Esperantysta“, którego własnością jest nasze pismo, opóźniła ukazanie się niniejszego numeru, co prosimy naszych czytelników łaskawie nam wybaczyć.

Skądinąd, znaczny spadek wartości marki polskiej zmusza nas podnieść prenumeratę dla Polski. Aby uniknąć na przyszłość niepożądanych zmian, postanowiliśmy obliczać takową w złotych polskich, oznaczając cenę jednego numeru na groszy 20=0,2 złotego (12 numerów=2 zł. 40). Bieżącą wartość złotego w markach polskich obliczać należy według urzędowego kursu Państwowej Pożyczki Złotej w ostatnim tygodniu.

Nasi prenumeratorzy proszeni są o ile możliwości jak najprędzej (we własnym interesie) nadesłać nam brakującą kwotę na konto P. K. O. Nr. 3874.

*Administracja.*

**Preseraroj**  
en la N<sup>o</sup> 4 de „**Pola Esperantisto**“.

Paĝo	Linio	Anstataŭ	Devas esti
49	13	tlista	tista
51	1	manko da mono kaj da	manko de mono kaj de la-
			borantoj
53	7	Kio montris	Kion montris
56	14	Ursoj	Urusoj
58	34	arkaĵo kalkulita konstrun	arkaĵo de kalkulita konstruo
66	6	dolara	dolora
66	33	tioakze	tiuokaze
67	35	ekspluati	ekspluati
70	32	dampas	venkas
70	27	liczby (vi	liczby mnogiej (vi

Krom tiuj, plej gravaj, troviĝas ankaŭ amasego da interpunkciaj eraroj, klujn la legantoj bonvolu korekti mem, pardonante ĉi tiun malzorgon al la redakcejo. Ĉi tiu lasta promesas fari ĉion eblan por eviti estonte tiajn bedaŭrindaĵojn.

**Zarząd Polskiego Towarzystwa Esperantystów zawiadamia, że w czwartek o godz. 8 w. dnia 12 kwietnia, odbędzie się zebranie towarzyskie z herbatką.**

**Pogadankę w języku Esperanto wygłosi Dr. S. Karłsbad.**

**Zarząd P. T. E. uprasza członków o spieszne wpłacanie składek tak zaległych, jak i za półrocze r. b. po Mkp. 1000—miesięcznie.**

**Pieniądze wpłacać można na konto czekowe P.K.O. N<sup>o</sup> 3874.**

**Redaktoro kaj eldonanto: STANISŁAW KAROLCZYK**

**Redakcio kaj administracio: Warszawa, str. Królewska 19.**

**Funkcias nur lunde kaj ĵaŭde de 8—10 h. vespere.**

**Presejo: Wacław Maślankiewicz. Warszawa, Nowogrodzka 17.**



ANTONI CZUBRYŃSKI

# ESPERANTO I ESPERANTYZM

z uwzględnieniem historii języka między-  
narodowego. Cena z przesyłką Mp. 800.

Do nabycia: Esperantista Voco, Jasło  
(Małopolska)

---

## Fadenoj Pola Fabriko de Fadenoj

Polska Wytwórnia Nici

Nowickiego i Brodnickiego Warszawa—Chmielna 65

Poŝtkeŝto № 1.

Serĉas pograndaĵn aĉetantojn kaj spertajn agentojn ĉiulande.

---

**ESPERANTISTOJ!**

**SUBTENU LA ANONCIĜANTAJN**

**ENTREPRENOJN!**

Montru, ke la mono, kiun

oni pagas por anonco en esperanta

gazeto ne estas vane perdita!

---

# ELDONĜO, „ESPERANTISTA VOĈO“, JASLO (POLLANDO)

(posedanto: Salo Grenkamp-Kornfeld)

liveras ĈIUN esperantajn librojn. Al konstantaj mendantoj n. konsilas malfermon de konto ĉe ni. Postulu nian katalogon!

## NI REKOMENDAS INTER ALIAJ:

(el originaloj)

ARGUS, Pro kio?  
DEVJATNIN, Esperanta afiksaro  
GRENKAMP, Krioj de k-ro  
MÖBUSZ, Dokumentoj de Esperanto  
POŝKALENDARETO por 1923  
PRIVAT, Kurso lernolibro  
Karlo  
Vivo de Zamenhof

el tradukoj:

AVSEJENKO, Fraŭlino Suzano  
BENEMANN, Tra la mondo, partoj I, II  
DIETLERLE, La Vendreda klubo  
GRENKAMP, Pensejoj  
OSSAKA, Perloj el oriento  
SALOM-ALEHEM, Hebreaj rakontoj.

---

---

## Kiel Polo kaj Esperantisto!

Por disvastiĝi eksterlande produktojn de Polujo, akirindaj pro iliaj boneco kaj malkareco, ankaŭ por pruvi al alilandaj komercistoj, same kiel al polaj fabrikantoj la utileblecon de nia helpa lingvo, ni proponas al ĉiulandaj Gesamideanoj preparoti ĉiuloke kun gravaj importistoj kaj pograndaĵaj aĉetantoj kiaj objektoj ilin interesas. Post sendo de la necesaj soligoj la reflektantoj ricevos rekomendite adresojn de senperaj fontoj kaj rekte, laŭeble tujajn ofertojn. Krom pole aŭ esperante, oni povas skribi france, angle, itale aŭ germane, ĉiam rekomendite, aldonante respondkuponon. (—) Samideano WACŁAW WOYDE, ŝtatoficisto, WARSZAWA (POLUJO), ulica Żórawia 38 — 14.

---

Redaktoro kaj eldonanto: STANISŁAW KAROLCZYK.

Presejo: Wacław Maślankiewicz, Warszawa Nowogrodzka 17.